

# Ĉiuj ni estas CIVITANOJ DE LA MONDO



**T**ra la tuta mondo, kreskanta nombro da homoj, kaj inter ili eminentuloj, deklaras sin CIVITANOJ DE LA MONDO. Ĉiuj aspiras al la protektado de la minacata vivo kaj sentas la bezonon organizi pacan mondon, kiu respektu homojn, popolojn kaj naturan ekvilibron.

## LA DANĜEROJ KONTRAŬ LA HOMARO

La multaj mondaj malekvilibroj plievidentiĝas depost la fino de fama "ekvilibro de la teroro".

La dislokado de amasdetruaj **armiloj** : atomaj, biologiaj kaj kemiaj ĉiutage pligravigas la riskon de fatala eraro, de akcidento aŭ de freneza ago.

La **mizero** de la plimulto, la skandalo de la malsatego fronte al abundo, kiun ĝuas malplimulto, la **poluadoj**, la **malŝparado** de la nerenovigeblaj naturaj riĉofontoj, la rapidega **kresko de la homaro**, la **mona malordo** la plioftiĝo de **perfortoj**, de **militoj** kaj de fenomenoj pri sociaj ruiniĝoj...

... Jen la nunaj problemoj, kiuj superas la kompetentecon de la ŝtatoj, kaj kiuj vere tutplanede ekzistas.

## LA ILUZIO DE LA INTERNACIAJ TRAKTATOJ : U.N.

Kial tiu institucio, kiu naskis grandajn esperojn, montris sin nekapabla solvi la pli multajn, internaciajn problemojn ? Kial interalie ĝi ne povis malhelpi la militojn ?

Tio estas ĉar sur la tribuno de Unuiĝinta Naciaro (U.N.) ĉiu el la registaraj reprezentantoj defendas la interesojn proprajn al sia lando, kaj **neniu tiujn de la tuthomaro**.

En tiaj kondiĉoj, ĝiaj decidoj restas senefikaj, ĉar ĉiu ŝtato permesas al si ne plenumi ilin nome de sia absoluta suvereneco.

## La 3an de marto 1996, la elektitaj delegitoj al la KONGRESO DE LA POPOLOJ lanĉas ALVOKON :

La 3an de marto 1966, dek tri monde famaj civitanoj de la mondo lanĉis alvokon por la monda civitaneco,

De tiam miloj da homoj konsciaj pri siaj respondecoj al la tutmonda komunumo kaj al la estontaj generacioj, decidinte agnoskigi siajn rajtojn de membroj de tiu komunumo, petis sian registriĝon kiel mondcivitanoj kaj kontribuis per naŭ transnaciaj balotoj al la elekto de dek ok delegitoj al la Kongreso de la Popoloj, anticipa Tutmonda Parlamento.

### Hodiaŭ

*dum oni konsentas pri la interdependeco de la mondaj popoloj ;*

*dum oni rekonas la transnaciecon de la malbonoj kaj minacoj, kiuj timigas la homaron ;*

*dum la UNaj instancoj, ĉar sen trudopovo, restas senpovaj kontraŭ la multformaj konfliktoj, el kiuj la etnaj konfliktoj ;*

*dum la ŝtata suvereneco ne plu estas netuŝebla;*

*dum ni lanĉas la dekan balotelekton al la Kongreso de la Popoloj,*

**Ni denuncas** la daŭran strebadon de la naciŝtatoj al hegemonio malprofite al la loĝantaroj ;

**Ni akuzas** la ŝtatojn, kiuj favorigas la sovaĝan tutmondiĝon, en kiu regas ĝangala leĝo, pretekstante liberalismon laŭdegas la konkurencecon, vera kialo de eksigo kaj de marĝenigo tiel de pli kaj pli multaj homoj de la socioj diritaj evoluantaj kiel de la evoluantaj landoj.

**Ni postulas**, ke estu konsiderataj la rezultoj de la diversaj grandaj Mondaj Konferencoj organizitaj pri demografio, medio, progresado, inoj... - tio atestas pri ekapero de tutmonda publika opinio - kaj ni postulas, ke la produktitaj bonintencaj deklarioj ne restu sen sekvo.

**Ni admonas** la ŝtatojn transdoni parton de sia suvereneco profite al tutmondaj supernaciaj institucioj demokratie balotelektitaj, kiuj provizite per limigitaj sed realaj povoj, estus kapablaj labori favore al solidareco inter la popoloj de la mondo kaj starigi leĝojn komunajn al ili.

### VI, CIVITANOJ EL ĈIUJ LANDOJ,

**ĉar vi estas veraj posedantoj de la popola suvereneco, al vi apartenas konigi viajn aspirojn pri unuiĝinta mondo**

**DEKLARANTE VIN CIVITANOJ DE LA MONDO.**

## **LA NECESA PARTA TRANSDONO DE ŜTATA SUVERENECO**

La rolo de la registaroj kiel defendistoj de la naciaj interesoj, senrajtigas ilin por solvi la problemojn, kiuj koncernas la sorton de la tuthomaro.

Antaŭ ol estos tro malfrue, partaj transdonoj el naciŝtata suvereneco favore al tutmondaj institucioj devos trudiĝi al ĉiuj landoj.

Jam la necesaj rezultantaj el la komuna ekspluatado de la planeda spaco kondukis al iuj faktaj transdonoj interalie profite al Internacia Unuiĝo por Telekomunikoj kaj al Monda Meteorologia Organizaĵo.

### **KIAJ TUTMONDAJ INSTITUCIOJ ?**

Cele al demokratia federacia organizado de la mondo, necesas institucioj :

- anstataŭigontaj per tutmonda leĝo kaj arbitracio la konkurencojn en la internaciaj rilatoj ;
- dototaj per realaj kaj bone difinitaj povoj por ke iliaj decidoj estu plenumitaj ;
- kontrolotaj de reprezentantoj de la popoloj. Tiuj reprezentantoj devos esti demokratie balotelektitaj per transnaciaj voĉdonoj senatente pri siaj ŝtatanecoj.

### **ĈU TIO MALFERMAS VOJON AL TOTALISMO DE SUPERŜTATO ?**

Ĉu ne estas risko, ke konsistiĝos centra povo celanta samaspektigi la popolojn kaj premi ilin sub la pezo de sia burokratismo kaj de siaj regularoj ? La Mondcivitanoj ne volas tian ŝtaton : laŭrole la tutmonda federacia povo ne trudos al ĉiuj nacioj komunan politikon sed nur arbitracios la konfliktojn inter la naciaj kaj la tuthomaraj interesoj, por ke ĉiu popolo konservu la liberan elekton pri sia socia tipo, pri sia elvolviĝa maniero kaj pri siaj kulturaj valoroj.

### **ĈU UTOPIAJ CELOJ ?**

Ĉiuj gravaj konkeroj de la homaro trairis la kreivan utopian stadion : tiel estas pri la mastrumo de la aeraj kaj interplanedaj spacoj de la

telekomunikadoj, de la aŭtomatigo de la produktado, kaj de la genetiko. Leonard de Vinci, Jules Verne kaj Aldous Huxley estis utopiistoj, kies plimultaj vidoj realiĝis.

Jam la skizo de la tutmondaj institucioj estas komencita. En la nuna okazo, la realigado ne dependas de teknologiaj progresoj sed de komuna volo de sufiĉe multnombraj loĝantoj de tiu planedo. La lasta ŝanco por la homaro estas, ke ilia realigado okazu antaŭ la detruo de ĝia speco.

***Kiuj ne estas tutmondistoj, tiuj estas utopiistoj.***

*(R-ro Robert Mallet)*

### **KOMUNA CELO TRANS ĈIES POLITIKAJ kaj FILOZOFIAJ OPINIOJ :**

Ĉiuj Mondcivitanoj ne same opinias pri politiko aŭ filozofio nek same konceptas pri la plej bona vojo iranta al tutmondaj institucioj. Al ili estas komunaj la respekto de aliulaj opinioj kaj la sento pri solidareco, kiu ligas ilin al la homaro. La registriĝo kiel Mondcivitano estas la fundamenta ago, tra kiu individuo agnoskas, ke nun estas la momento por planedskale organizi la mondon, kaj sin devontigas labori por la estigo de tiuj novaj interpopolaj rilatoj.

### **PLENUMU VIAJN RESPONDECOJN !**

La tutmondisma argumentaro ne lasas vin indiferanta. Vi preferus tutmondisman sed vi pensas : "Kial tio ? Kion je mia nivelo mi povas fari por ŝanĝi la estontecon ?"

Kiam vi demandas vian ĉirkaŭantaron vi trovas en ĝi multajn homojn, kiuj same opinias. Sur la tuta tero oni renkontas tiajn laŭkore tutmondistojn agade paralizitajn pro sia fatismo kaj pro sia sento de nepovo por influi la sorton. Jen la eraro. Registritaj kiel mond-civitanoj, ili eliros el sia izoleco. Ili konsciiĝos pri la forto, kiun ili reprezentas, pri la ebla pezo de siaj voĉoj super siaj elektitoj kaj super la registaroj. Ili povos komuniki kun aliaj mond-civitanoj de ia ajn lando. Ili informiĝos pri ĉiu paŝo farita al la komuna celo, pri ĉiu grava aliĝo, pri ĉiu okazo partopreni en komuna tutmondisma agado. **Tial vi plenumu de nun viajn respondecojn al via familio, al viaj samsortuloj kaj al posteularo per peto de via mond-civitana legitimkarto.**

---

La **TUTMONDISMO** estas la tuto de la ideoj kaj agoj esprimantaj la solidarecon de la globloĝantoj kaj celantaj starigi supernaciajn instituciojn kaj leĝojn kun federacia strukturo, kiuj estu komunaj al ili, en la respekto de la diverseco de la kulturoj kaj popoloj.

La **TUTMONDISMO** estas ankaŭ scienca aliro al sociaj interindividuaĵ fenomenoj konsideritaj de monda vidpunkto.

La **TUTMONDISMO** provas proponi novan politikan organizadon de la homaro implicantan la transdonon de iuj partoj de la naciŝtata suvereneco al Monda Federacia Aŭtoritato kapabla solvi per decidoj de la plimulto la problemojn, kiuj koncernas la sorton de la homa speco, tiaj, kiaj : malsato, milito, poluado, troloĝateco, kaj energio.

*La postuloj de la tutmondismo ne povas kontentiĝi per la sensankciaj devontigoj de la internaciaj traktatoj aŭ interkonsentoj.*

## **Kelkaj citaĵoj**

Krom se monda registaro estos rapide konsistigita kaj efike ekfunkcios, la tuta estonteco estas malhela kaj necerta.

*Winston CHURCHILL*

Monda federacio estas la tasko, kiu malfermas por estonteco la plej pozitivan perspektivon.

*Willy BRANDT*

La nura maniero elturniĝi estas meti tutmondan leĝon super la registarojn, do fari tiun leĝon, do disponi pri parlamento, do konsistiĝi tiun parlamenton per mondaj balotelektoj, en kiuj partoprenos ĉiuj popoloj.

*Albert CAMUS*

La scienco igis la nacian suverenecon neakordigebla kun la pluvivo de la homaro. La nura alternativo estas nun aŭ monda registaro aŭ morto.

*Bertrand RUSSEL*

Naciismo ne estas la plej alta koncepto. La plej alta koncepto estas la monda komunumo.

*GANDHI*

Unu unuiginta mondo aŭ nenio.

*Albert EINSTEIN*

En mia spirito estas neniu dubo, ke monda registaro devas veni kaj venos, manke de tio la mondo tendencos sin mortigi.

*Pandit NEHRU*

Esti civitano de la mondo estas veti por la pluvivo de la homaro.

*Jean ROSTAND.*

Necesas apliki je monda nivelo, kion ni aplikas je landa nivelo : demokration.

*Dominique de Villepin (France-Inter 22/05/03)*

Antaŭ ol esti serĉisto pri astrofizikisto, mi estas terloĝanto kaj civitano de la mondo.

*Hubert REEVES.*

Mi estas nek el Ateno, nek el Korinto, mi estas civitano de la mondo.

*Socrate*

Mi kantas Hispanion kaj sentas ĝin ĝis medolo, sed mi estas unue civitano de la mondo kaj ĉies frato.

*Federico Garcia Lorca*

Mi estas patrioto de homaro. Mi estas civitano de la mondo.

*Charlie Chaplin*

Se la registaroj laborus kiel la orkestroj, ni havus multe pli da paco kaj harmonio en la mondo ; sed se la orkestroj laborus kiel la registaroj, neniu plu aŭdus eĉ unu noton.

*Isaac Stern.*

Necesus ia internacia registaro... tra kiu ĉiuj nacioj rezignus, parte, sian suverenecon.

*Alberto Moravia*

La tero estas mia patrujo kaj la homaro mia familio.

*Khalil GIBRAN*

## **13 monde famaj CIVITANOJ DE LA MONDO alvokas**

**Manke de supernacia leĝo la ŝtatoj estas devigataj kalkuli je forto por defendi siajn interesojn. Konsekvenco : la milito ĉu vola ĉu akcidenta iĝanta, depost la atoma malintegrado kaj de la disvolviĝo de la bakteriaj armiloj, la absurda "fina solvo", la genocido vastigita al la tuta homa raso..**

**Manke de tutmondaj institucioj kapablaj certigi la kontentigon de la fundamentaj bezonoj komunaj al ĉiuj, la homa persono estas ofendmokata. Dum grandegaj riĉaĵoj estas malŝparataj, du trionoj el la homaro suferas malsaton.**

**Tamen la sciencaj kaj teknikaj progresoj ebligas organizadon de tutmonda komunumo, en kiu regus paco kaj abundo, en kiu la fundamentaj liberecoj estus garantiataj al la individuoj, al la popoloj, al la nacioj.**

**Kial ne estas tiel ? Ĉar la registaroj hipnotizitaj de sia devo antaŭigi la naciajn interesojn de sia lando, for de konsento pri la necesaj transformadoj, eĉ malhelpas la agadon de la internaciaj institucioj kreitaj por defendi la universalan pacon kaj servi la homojn.**

**Tial, la savo povas veni nur de la monda popolo, de la individuoj ĝin konsistigantaj, de ĉiu el ni.**

**La unua ago, simpla sed efika, al kies plenumo ni invitas ĉiun el vi, kiel ni mem faris, estas **registri sin kiel MONDCIVITANON.****

**La dua paŝo, kiun ni kune faros, se vi sufiĉe multnombre respondos al nia alvoko, estos organizi sur transnacia bazo la balotelekton de delegitoj komisiotaj por defendi la homan aferon, esprimi la depostulojn de la monda popolo, kaj fine ellabori la leĝon de pacema kaj civilizita mondo.**

Subskribis (la 3an de marto 1966) :

**Lord BOYD ORR** (Britio) Nobelpremiito pri paco ;

**Josué de CASTRO** (Brazilo) verkisto de "Geopolitiko de la Malsato" ;

**Danilo DOLCI** (Italio) instiginto de la sociaekonomia elvolviĝo de Sicilio, Leninpremiito ;

**SHINZO HAMAI** (Japanio) eksa urbestro de Hiroshima ;

**Prof.J.L.HROMADKA** (Ĉeĥoslovakio) prezidanto de "Christian Peace Conference" ;

**Prof.Alfred KASTLER** (Francio), Nobelpremiito pri fiziko ;

**S-ino Rayan NEHRU** (Hindujo) ;

**Prof.Linus PAULING** (Usono) Nobelpremiito pri ĥemio kaj pri paco ;

**Abato PIERRE** (Francio) fondinto de la komunumoj "Emmaüs" ;  
**Jean ROSTAND** (Francio), biologo, membro de la Franca Akademio ;

**Lord Bertrand RUSSEL** (Britio) filozofo kaj matematikisto, Nobelpremiito pri literaturo ;

**Prof.Ivan SUPEK** (Jugoslavio), membro de la Jugoslavia akademio de sciencoj kaj artoj ;

**Prof.HANS THIRRING** (Aŭstrio), membro de la Scienca Akademio.

**REGISTROLIBRO DE LA MONDCIVITANOJ** (66 boulevard Vincent Auriol, 75013 PARIS) estas ne-registara organizaĵo.

Same kiel ĉiu dokumento liverita de NRO la **mondcivilitana legitimkarto ne estas aprobita de la ŝtatoj, kaj ĝi neniel liberigas el la regula posedo de oficialaj dokumentoj**, kiel nacia legitimkarto, pasporto, vizo, laborpermesilo, restadpermesilo kaj aliaj.

La mondcivilitana legitimkarto estas simbola pri natura aparteno al la monda komunumo, sed ankaŭ pri volo iam vidi la problemojn komunajn al la tuta homaro solvataj per juro kaj leĝoj estigitaj de monda demokratio. Posedi legitimkarton, montri ĝin al siaj amikoj, siaj konatuloj valoras kiel konstante deklari, ke la mondo ne finis sian konstruadon, ke ĝi ankoraŭ ne unuigis, kaj ke en ĝi la homaj rajtoj ankoraŭ ne povas esti garantiataj.

# Ĝkapero de monda demokratio

Dum kunveno okazinta en Bruselo en 1963 inter la reprezentantoj de 43 organizaĵoj favoraj al monda demokratio, estis decidita la iompostioma starigado de **Kongreso de la Popoloj**. La realigado de la projekto estis konfidita al « Komitato por la Kongreso de la Popoloj ». Tiu komitato rolas kiel konstitucia akompananto de Kongreso de la Popoloj : ĝi aranĝas la balotelektojn, plenumas la necesajn provizorajn anstataŭojn kaj diskonigas opiniojn pri la konstitucieco de la agoj de Kongreso de la Popoloj.

La **KONGRESO DE LA POPOLOJ**, estas stadio al Monda Asembleo kapabla starigi kaj kontroli la tutmondajn instituciojn nepre necesajn por la pluvivo de la tuthomaro kaj por la antaŭgardo de la biosfero.

Konforme kun la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, Kongreso de la Popoloj konsistas el :



↳ **Asembleo** (ankaŭ nomita **Mondcivitana Asembleo**) el pli ol 150 aliĝintaj organizaĵoj kaj el forumo da individuoj. La Asembleo estas institucio por partoprena demokratio rilata al la problemoj kun tutmonda intereso. Ĝi eldonas bultenon en pluraj lingvoj.

[www.recim.org/kdp/assembleo.htm](http://www.recim.org/kdp/assembleo.htm)

↳ **delegitaro** el 45 delegitoj elektitaj de voĉdonintoj disloĝantaj en pli ol 114 landoj, per transnaciaj balotelektoj. La mandato estas naŭjara. La elektitaj Delegitoj estas renovigataj trione ĉiun trian jaron. La estontaj balotelektoj okazos en 2019 por la elekto de 15 Delegitojn.

[www.recim.org/kdp/senato.htm](http://www.recim.org/kdp/senato.htm)

## REGISTROLIBRO DE LA MONDCIVITANOJ (RCM)

estas sennacia institucio fondita la 1an de januaro 1949. Ĝi kontrolas en ĉiuj landoj la liveradon de la Mondcivitanaĵ legitimkartoj. Ĝi konsistigas la mondajn listojn de voĉdonantoj.

↳ **Civitanoj de la Mondo**,  
66 Boulevard Vincent Auriol, 75013 Paris.

☎ 0145 86 03 58.

[registre.cdm@gmail.com](mailto:registre.cdm@gmail.com)

La **Mondcivitanaĵ Registrocentroj**, **Oficistoj de monda civila stato**, kaj la **Korespondantoj de Registrolibro**, instalitaj en pli ol 50 landoj fare de RCM diskonigas la tutmondistajn tezojn kaj disdonas la mond-civitanaĵn legitimkartojn.

↳ [www.recim.org/cdm/adres.htm](http://www.recim.org/cdm/adres.htm).

## Konsilio de Mondcivitanaĵ Teritorioj

Ekde 1949, 1016 komunumoj kaj urboj el 20 landoj **simbole** deklaris sin « *mond-civitanaĵ teritorioj* » kontribuante per la konsciigo de la enloĝantoj en la progreso de monda demokratio.

• ↳ [www.recim.org/dem/conseil-eo.htm](http://www.recim.org/dem/conseil-eo.htm)

**Por pli da informoj pri la strukturoj, la projektoj, la aktoj, la arkivoj :**

- Citoyens du Monde, « Les Nids », 49190 St-Aubin de Luigné (France)
- [www.recim.org/mond-civitano.htm](http://www.recim.org/mond-civitano.htm)